

# Esperanto and the UN

## Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 64, majo-junio 2023



Universala Esperanto-Asocio



### UEA festis Internacian Virinan Tagon 2023

Kiel notite en nia marta Informilo, okaze de la Internacia Virina Tago, la 8-an de marto, Universala Esperanto-Asocio publikigis specialan mesaĝon, kiu estis komunikita al Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko kaj vaste disanoncita tra la mondo: “Ni daŭrigos kaj intensigos nian laboron por virinaj rajtoj kaj por plibonigo de la situacio de virinoj kaj knabinoj tra la mondo, kunlabore kun aliaj civilsociaj organizoj,” la mesaĝo deklaris.

“Genra egaleco kaj plena partopreno de virinoj en ĉiuj sferoj de la vivo estas esencaj. Ni devas antaŭenigi tiun egalecon ĉie. La ĉi-jara temo de la observo-tago — Novigo kaj teknologio por genra egaleco — atentigas pri efikoj de la ‘cifereca divido’ sur ekonomiaj kaj sociaj malegalecoj. Virinoj kaj knabinoj povu sekure kaj libere aliri ciferecajn spacojn.”

La mesaĝo atentigis, ke, por atingi pli grandan inkluzivecon, “ni bezonas pli lingve diversan interreton.” Tiu vasta aro de scioj “estos utila nur se homoj povas kompreni ĝin. Inkluziveco gravas por faciligi ĉiuspecajn rilatojn inter homoj, celante evoluigon kaj solidarecon inter popoloj malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo.”

“La Internacia Lingvo, per sia tutmonda reto de Esperanto-parolantoj, donas okazon por vere internacia komunikado kaj komparado pri la situacio de virinoj ĉie en la mondo. Ni aparte estimas tiujn kiuj uzas Esperanton kiel voĉon de tutmonda civila socio.”

### UEA emfazis lingvan unuecon en diverseco, okaze de la Internacia Tago de Familioj, speciala tago de UN

“Respekto de bazaj homaj rajtoj postulas, ke ni, kiel individuoj kaj kiel ŝtatoj, subtenu la familion, kaj ankaŭ prezentu ĝin kiel modelon de respekto, konfido kaj kompreno,” laŭ la mesaĝo publikigita de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de UN pri Familioj, 15 majo 2023. La mesaĝo, adresita samtempe al la membraro de la Asocio kaj al Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, emfazas la fakton, ke ni devas

fortigi familiojn kaj kreskigi ilian prosperon, samtempe konservante praktikan ekvilibron inter la nombro de mondaj loĝantoj kaj la kvanto de mondaj resursoj.

UEA troviĝas en bona pozicio por helpi al la liverado de tiu mesaĝo: “Universala Esperanto-Asocio havas membrojn kaj organizojn tra la tuta mondo – homojn aparte konsciajn pri la fragileco de nia planedo kaj pri la graveco de monda komunikado por solvi mondajn problemojn. Ni hejme parolas multajn lingvojn, sed formas ‘unu rondon familian’ (laŭ la vortoj de nia fondinto) pro tio, ke ni posedas komunan ‘familian’ lingvon.”

La mesaĝo finiĝas per la konstato pri Esperanto, ke “Ni celas dediĉi tiun internacian lingvon al la solvo de problemoj de milito kaj paco, de homaj rajtoj, kaj de homa konfido.”



### Esperanto-aranĝoj ĉirkaŭas la mondon

La nove starigita Eventa Servo de Universala Esperanto-Asocio (eventaservo.org) prezentas kalendaron de Esperanto-aranĝoj tra la mondo. La servo, daŭre pli populara inter organizantoj, listigas dekojn da aranĝoj ĉiutage, sur ĉiu kontinento, ekde naciaj kaj internaciaj konferencoj ĝis lokaj kunvenoj kaj virtualaj renkontiĝoj. Ni laŭ la hazardo elektis du datojn: por la 28-a de februaro estis anoncitaj aranĝoj en Barato, Belgio, Francio, Germanio, Kanado kaj Nepalo; por la 4-a de marto la listo enhavis anoncitajn aranĝojn en, interalie, Britio, Ĉeĥio, Demokratia Respubliko Kongo, Francio, Germanio, Kanado, Nepalo kaj Usono.

La junulara Esperanto-organizo TEJO okazigis tri internaciajn ĉeestajn renkontiĝojn en Eŭropo en marto kaj aprilo: seminarion en Tuluzo, Francio (10-20 marto); junularan festivalon en Palmi, Kalabrio, Italio (5-11 aprilo) kaj semajnfino organizitan de la germana filio de TEJO en la regiono Sächsische Schweiz, apud Dresdeno. La jarkongreso de TEJO okazos en Lignano Sabbiadoro, Italio, de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto.

### Pasporta Programo

Passporta Servo, internacia programo administrata de TEJO (la internacia organizo de la junularo esperantista), kiu liveras senpagajn tranoktojn por Esperanto-parolantoj, spertis malrapidiĝon dum la pandemio, sed, laŭ lastatempa statistiko, malpli severan ol oni povus atendi. Pli ol kvarmil informpetoj pri tranoktado estis ricevataj en 2022, kvankam oni ne scias kiom da ili realiĝis per restado de unu nokto aŭ pli. Ja ekzistas multaj indikoj, ke Esperanto restas populara inter gejunuloj, kaj ke, se entute okazis ŝanĝo, temis pri tio, ke la pandemio kondukis al plimultiĝo de la nombro de lernantoj de Esperanto: <https://www.pasportaservo.org/pri-ni/>

## **Esperanto antaŭeniras en Afriko: La monda kongreso de UEA okazos en Tanzanio en 2024.**

Laŭ invito de la Esperanto-Asocio de Tanzanio, UEA okazigos sian Universalan Kongreson de 2024 en Aruŝo, Tanzanio. Temos pri la unua Universala Kongreso en Afriko. Kutime, la Universalaj Kongresoj (tiu ĉi estos la 109-a) kunvenigas inter 1000 kaj 2000 partoprenantojn el la tuta mondo. La precizajn datojn oni devos ankoraŭ fiksi, sed plej verŝajne la unusemajna aranĝo okazos en julio aŭ aŭgusto.

Esperanto daŭre antaŭeniras sur la afrika kontinento. La 8-a Afrika Kongreso de Esperanto okazis en Senegalio en decembro. Novan nacia Esperanto-asociacion oni lastatempe starigis en Kongo (Brazzaville), kaj en la Demokratia Respubliko Kongo oni daŭrigas preparojn por sendi delegacion de la nacia Unesko-komisiono al la Universala Kongreso de Esperanto en Torino, Italio, en julio. Dume, delegacio de kvin francaj parolantoj de Esperanto, akompanataj de dek lokaj esperantistoj, pasigis monaton en januaro kaj februaro en diversaj urboj de Togolando kaj Benino proponante la instruadon de Esperanto en lernejoj, sub aŭspicio de la Instituto Zamenhof.

## **Reeĥas la efikoj de la Tago de la Gepatra Lingvo**

Kvankam pasis du monatoj de post la Tago de la Gepatra Lingvo de UN kaj Unesko (21 februaro), novaĵoj daŭre atingas nin pri agado ligita al la festado. La junulara organizo esperantista TEJO organizis serion de aranĝoj “Junularo kaj Lingvo” por agnoski la kontribuon de gejunuloj al la antaŭenigo de lingvaj rajtoj. Partoprenantoj ĝuis mallongajn kursojn, prelegojn, kvizojn kaj aliajn agadojn pri lingvoj de Azio, Eŭropo kaj Ameriko. Samtempe aperis artikolo pri Esperanto kaj planlingvoj en la reta scienca sekcio de la rusa novaĵburoo TASS, kiu prezentis la historion de Esperanto, klopodojn favori ĝin en internaciaj organizoj ekde la Ligo de Nacioj, kaj la fenomenon de denaskaj Esperanto-parolantoj. Tio estis nur unu el multaj artikoloj kiuj aperis en la amasmedioj tra la mondo.

---

**Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. [www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org).**